GISTO-MAJ-05
G.O.VASKE
Str.Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
(Skribo ttt-kongrua)

SUGESTO.

Chiu balbutulo emas pravigi sin per la fusxa senkulpigo: mankas al mi kunulo kun kiu mi povas chiutage konversacii, babili. Chu vere mankas? – Mi asertas, ke ne!

Chiu kristano kredas je sia Gardangxelo au Gvidanto spirituala. Kredantoj de aliaj religioj certe havas siajn specifajn estulojn, kiuj akompanas kaj sxirmas la homojn. Jen do kunulo fidinda, kiu ne primekos au primokos viajn mankojn, afero ter gxena por komencantoj. Sugesto valora konsistas el tio: vi rolu lertulon pri viaj farendajxoj kaj proponu al via sxirmanta estulo precize instrui (sxlin?) chiujn detalojn de la de vi farendaj laboroj en la hejmo, surstrate, enoficeje, ie ajn.Sed ne nur mense. Ochigu la pensojn. Tiel estas senfine multaj gravaj eroj instruindaj al via nevidebla amiko. Vochigu viajn pensojn au, nur en via “pensejo” formulu la frazojn same kiel okazus se vi devus al iu persono akurate lernigi specialajn aferojn, kiel ekzemple ech antau ol vi ellitigxas: dankon, mia zorga Gardangxelo, pro via sxirmado dum la tuta nokto – lasu min starigxi...sed, kie metigxis miaj pantofloj? – Nu, jen ili – certe mi flanken sxotis ilin dum enlitigxo. Tuj al la necesejo, la veziko premas. Nun bani la vizagxon – Ba... kiel malvarmas la akvo! – Ne gravas, tio utilas por plene veki min – Nun prepari la kafon – Domagxe la gaso gxuste nun finigxas! – malbonsxanco sed, ni havas rezervan ujon – okazas prokrasto sed mi ne perdos la gxustan minuton enbusigxi. – Per milaroj da eroj vi pasigas la tagon. Dum krepuskigxo vi sidigxas, por duonhora ripozo ekstere de la domo, kontenta ke dum la tago chio kontentige okazis sed...ho ve, la fusxulo, mia edzo forgesis depreni la vestajxojn sur draton metitajn, por ke ili sekigxu...mi insiste petis al li, antau ol eldomigxi.(Similan ne-atenditajxon povas vochigi la edzo, en la kazo ke sxi restis hejme). – Jen do ekzemplo de paroliga metodo kiun devas adopti chiu homo al kiu mankas la gxusta vorto, kiam sxli, (se vi permesas al mi uzi la proponon de nia kara Luis), volas flue interparoli kun geamikoj. Chi ekzemplo ne enhavas referon al iu ajn el niaj geamikoj. Rekomendindas teni vortaro apude, por kazoj kiam necese konsulti gxin. Ne forgesu: sur la sojlo, la 40ª BEK kaj la gauchoj sxuldas ne hontigi la E-movadon!

PETO

Al vi, karaj gelegantoj, mi petas (escepto por tajperaroj) senskrupule “fingromontru”, per letero al mi miajn kutimajn misojn kaj gramatikajn erarojn enhavatajn de Gisto. Delonge mi prokrastas chi decidon, sed nun mi publikigas la peton. Tion mi petas char vi, pli junaj, eble ne volis gxeni chi oldulon kvankam mi jam ofte parole petis opinion tiurilate. Mia kutimo iel sxerce admoni “ne oldigxu!” valida chefe por mi mem elstarigas la fakton ke grizuloj tro facile forgesas detalojn tuj post kiam ili estigxis en la kapo.Notu al vi, ke mi kuragxis eldoni Giston imite al italidoj. Kvankam ofte okazas ke ili ne plene fidas siajn plenan kapablon pri specifa afero, ili nudabruste alfrontas konkurantojn kaj konkeras siajn spacojn. Al chiuj vi mi kore antaudankas viajn alskribojn kaj pro la “rabato” per kiu vi favoras min.

TASKO

Kiel gxuste diri, en Esperanto: “MARCA-PASSO” – “PEDÁGIO” – “CACHORRO-QUENTE” ? – Por chi-lasta em la e-reto oni sugestas: “Kolbasbulko” kaj/au “Kolbaspano”.BV , rompu la pensejon, proponu kaj vochdonu pri unu el la lastaj proponoj.

EMBASADEJOJ

Multaj fiagoj kaj krimoj okazas alilande kontrau legxoj kaj moroj. TV montras kruelajxojn kontrau animaloj, ekzemple, povraj hundetoj perforte tirataj al buchejoj, vivaj ratoj jxetataj sur varmegan fornoplaton cele ilin senhautigi kaj, multaj aliaj krimoj (komercado de inoj, por sklave servi kiel prostituinoj) defilas antau la okuloj de spektantoj tra la tuta mondo. Jen sxanco por Esperanto montrigxi kontrau perfortoj: leteri al la embasadejoj, EN ESPERANTO. Oni zorgu entekstigi laueble multajn loknomojn kaj nomojn de gravuloj de ties lando, por tiel kauzi scivolon al ties estraro pri kio oni plendas. Je tia entrepreno oni ne riskas, kiel dum striko, perdi sian laborpostenon. Por tiu tasko sufichas esti NE-pigrulo kaj elposxigi nur kelkajn cendojn por la posxta afranko.

ECHOLINK (Ekolink)

Geesperantistoj tro neglektas belajn sxancojn farigxi felichaj per kvazau personaj renkontigxoj inter gesamideanoj, per Ekolink. Chiu semajnfine okazas charmaj kunsidoj, chiu sur sia plej komforta fotelo, en sia propra hejmo. Sopire alstrebas tion, kolegoj el pluraj mondopartoj kiel Siberio, Japanio, Britio (nia gaucho, Lenio) Braziljo, (Eni) PY3ACE plus pluraj kolegoj el Brazilo. Kondichoj por atingi la celon: farigxi radioamatoro kaj posedi komputilon. La kosto? Por la tuto sufichas ami Esperanton, flankenlasi turistadon, restoraciojn, ne fumi, ne festadi pli ol unu fojon dum unu jaro. Post ne multaj jaroj vi sxparis sufiche kaj sentos sin venkinto super chiuj gxuoj ne favoraj al nia idealo.

CHO-RO-I

Neniu Gisto-leganto interesigxis pri raporto al tiu brodkasta stacio. El tio konstateblas ke dauras la negativa kutimo “mortigi” radioelsendojn, pro manko de leteroj al ties estraroj. Chu estas bezone ripete krachi sur viajn piedojn por ke vi konsiigxo, ke leteroj al E-stacioj valoras al cheko plenigota lau cirkonstancoj fekundaj por ties estraranoj??

ESTRARO DE FEB/RS

La dekduan de majo denove mi kontrolis: neniu vorto pri nia 40 ª BEK legeblis en la montrofenestro de la librovendejo che la strato Andrade Neves, en Porto Alegre. Versxajne neiu GEA-estrarano kuragxis argumenti che la gaucha Federacio, por plene eluzi la eventon, por diskonigi la E-movadon brazilan. DOMAGXO!

Iom da bonhumuro:..... KONSCIENCO PEZA..(El DG)

Geo dormadis en dolcha paco, hejme, kiam ili audis chirkau la tria frumatene, kvazau bruon de invadanto en la domon.

- Fugxu...fugxu! – diras la ino malespere – devas esti mia edzo!

La kunulo, ne plenkonscia ellitigxas plennuda, rapide elsaltas tra la fenestro. Post kiam li estis falinta sur malsekan arbuston, li kolere revenas kaj diras: fiulino! Via edzo estas mi! - Chu jes? Sarkasme diras sxi...kaj vi elsaltis la fenestron, kial?